



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Abonu nun

PILO-PRESS

por 1976

Jara kotizo

30,-- GM

=====

Eldononto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69


N-ro 36/1975 13 oktobro 1975
Aperas ĉiusemajne

19a Jarkunveno de la germanaj fervojistoj-esperantistoj

Treuchtlingen (pp) Fakte la tradicia jarkunveno de la Asocio de germanaj fervojistoj-esperantistoj (G D F A) estis planita unue por Garmisch-Partenkirchen. Sed la malfacila ekonomia situacio de la germanaj fervojoj (DB) malhelpis kunveni en la konata luksa loko. Anstataŭe oni devis kontentigi pri malgranda loko en la frankonia provinco. Ĉiukaze la fervoja krucpunto Treuchtlingen povis gastigi la 130 partoprenantojn el FRG kaj kelkaj eŭropaj landoj.

La programo antaŭvidis la tradiciajn erojn: ekskursoj, delegit-kunveno, salutvespero, dancado, matineo. Nova en la programo estis informvespero por la enloĝantoj. Kaj fakte ĉeestis ĉ. 30 personoj, kiuj rigardis sonbildprelegon pri Japanio de s-ino E. Kruse, aŭskultis la informparoladeton de Joachim Giessner kaj entuziasme kunagis en malgranda publeciono, kiun sukcese plenumis Heinz Dieter Hartig el Bremen. Ekestis la deziro okazigi en Treuchtlingen Esperanto-Kurson, kiun gvidos, se ĝi realiĝos Ludwig Pickel el Nürnberg. Ankaŭ la ekspozicion kaj la librostandon vizitis kelkaj interesuloj el la loko.

Cetere la loka gazeto Treuchtlinger Kurier kelkfoje favore raportis pri la kunveno, ankaŭ gazetoj el najbaraj urboj.



Die Ausstellung vermittelt einen Eindruck über die Möglichkeit und Ziele der Weltsprache.

La salutesperon partoprenis ankaŭ aliaj anoj de la sociala organizo de DB el Treuchtlingen kaj ĉirkaŭaĵo. Salutis reprezentantoj de la fervoja direkto München kaj de la fervojaj sindikatoj.

Specialan dankon meritas Josef Weidacher, München, kiu kiel distriktkonisiito respondecis pri la preparoj!

Kongreß mit Ausstellung und Veranstaltungen am Wochenende
Eisenbahner - Esperantisten
für gemeinsame Sprache
Beim Begrüßungsabend in der Stadthalle wirkt auch der Gesangsverein
Treuchtlingen mit — Ausstellung Samstag und Sonntagvormittag geöffnet

Joachim Giessner, la prezidanto de GEFA kaj IFEF, diris dum la salutvespero i.a.:

"Nia jarkunveno kondukis nin ĉi-jare ne tro malproksimen de la loko de nia pasintjara, de Bamberg. Kaj kvankam Treuchtlingen ne povas oferti al ni tian abundon da historio kaj pitoreskaĵoj kiel Bamberg, ĝi tamen prezentas al niaj eksterlandaj gastoj kaj certe ankaŭ al ni germanoj la tipon de germana urbeto, aminda, iom provinca, ankaŭ admirinda pro ĝiaj sukcesplenaj streĉoj utiligi al si la eblecojn de la moderna nuntempo.

Kiam en printempo de tiu ĉi jaro ni subite devis nuligi la ĝistiamajn preparojn en Garmisch, origine antaŭvidita por la 19a jarkunveno, kaj devis ekprepari denove tie ĉi, ni dubis pri bona solvo. Nur kiu iam jam preparis tiajn aranĝaĵojn, scias, kiel malfacile troveblas taŭga loko kaj taŭgaj salonoj nur kelkajn antaŭe. Kaŭzo por la ŝanĝo estis vidpunktoj, diktitaj de la ĝuste tiam abrupte ŝanĝinta situacio de la germana fervojo kaj ties Sociala Organizo. La bona solvo tamen venis, ĉar ek de la unua minuto post tiu ŝanĝo ni havis la plenan subtenon de la BSW-distriktestraro en Munkeno, de ties loka grupo ĉi tie kaj de la urbaj instancoj en Treuchtlingen. Al ili ĉiuj ni ŝuldas nian sinceran dankon, ke tamen en duona jaro eblis prepari la jarkunvenon. Ek de la unua momento ni sentis agrablan atmosferon, intereson por nia afero kaj plenan pretecon prifaciligi al ni nian iom komplikan taskon."

En la matineo oni vidis filmon pri la IFEF-kongreso en Villach, farita de W. Barnickel, kaj folklorajojn. Anni Wiesmann, sopraniŝtino, el Grafenau, prezentis kantojn en Esperanto, plane akompanita de Elisabeth Ritterspach. Ĉiuj rikoltis multe da aplaŭdo.

Dum la matineo Joachim Giessner komentis la skribe disdonitan jarraporton de GEFA. Tiujn komentojn ni ĉi-sube publikigas.

Komentoj pri la Jarraporto de GEFA

Joachim Giessner, la prezidanto de GEFA, diris:

"Ŝajnas al mi, ke ne necesas ripeti ion el la teksto de la jarraporto, kiun vi komplete ricevis kun viaj paperoj, kiu krome aperos en nia Bulteno. Jarraporto estas sobra dokumento sen emociaj elparoloj. Eble estas nun konvena minuto, prijuĝi ne la raporton, sed nian agadon kaj situacion. Prilumigante ilin, oni devas konfesi, ke ambaŭ ne povas kontentigi. Ambaŭ suferas pro du gravaj mankoj, nome la manko de konsciaj, agemaj kunlaborantoj unuflanke kaj la manko de membroj, precipe de junaj membroj aliflanke.

Estas nur malmultaj kunlaboremuloj, kiuj, parte jam de longaj jaroj, sindone dediĉas siajn tempon kaj forton al nia asocio tiel certigante ties vivon. Sed estas multe tro multe da indiferentuloj, kiuj volonte ĝuas la avantaĝojn, kiujn ofertas la Internacia Lingvo al siaj parolantoj, sen pripensi, ke tiuj ĉi avantaĝoj grandparte ne ekzistus sen la daŭraj klopodoj de ĝuste tiu malplimulto da agemuloj. Nur malforta konsolo estas la konstato, ke samaspektas ankaŭ en aliaj organizaĵoj. Ni nepre konsciigu, ke kompare al la nombro de germanaj fervojistoj - nia asocio simple estas tro malforta. Kvankam la komplikajoj estas konataj, ekzistas sufiĉe da ekzemploj, kie pro la respondeca, lerta agemo de ofte nur unu sola persono ekkreskis loka grupo kun vigla vivo aŭ male aliaj ekzemploj, kie pro inerteco de la grupanoj trankvile formortis tio, kion aliaj personoj pli frue kreis. La celo de tiuj ĉi vortoj estas, vin peti; cerbumu pri tiu problemo, cerbumu ĉu vi ne trovas en viaj propra medio kaj ĉirkaŭaĵo eblecojn, vigligi la duondormantajn samideanojn

aŭ entute fondi novan ĉelon de nia afero. Urte necesas tiaj klopodoj.

La dua manko, la junuloj, nin ĉiujn koncerne. Ni ne permesu al la cirkonstancoj premi nin kontraŭ muro. Al ni ĉiuj konataj estas la terura situacio de nia fervojo, situacio influanta la vivon de preskaŭ ĉiu fervojisto. Kaj ni konas la same terurajn influojn, kiuj tagon post tago subjugas la junajn homojn. Multege da gejunuloj sopiras "ion", kio povus doni sencon al ilia vivo. Ni ekkonu tiun ĉi breĉon. Ni ofertu al ili tion, kio donos sencon al ilia ekzistado, nome nian lingvon. Kaj per tio ni samtempe atingos, ke nia asocio ne iun tagon mortos pro manko de membroj, ĉefe pro nia propra interteco; ĉiuj, ĉiuj ni respondecas pri tio.

Jarkunveno en 1975 ne povas pretervidi la - kiel mi jam menciis - situacion de nia entrepreno. Ne estas mia tasko, prilumigi ĝin aŭ eĉ komentarii. Tion faru reprezentantoj de sindikatoj kaj profesiaj organizaĵoj. Kio nin interesas estas la fakto, ĉu kaj kiel tiu situacio influas nian agadon. Kaj certe oni devas konstati, ke ĝi ja influas ĝin. Ne nur, ke ankaŭ en tiu ĉi sektoro la financrimedo rigore estas limigitaj. Tion oni ja - se necese - povas egaligi per propraj oferoj. Kaj mi povas sciigi al vi kun ĝojo, ke pasintan printempon dum kunveno de la GEFA-estraro kun la distriktkomisiitoj, la kunvenintoj unuanime samopiniiis, ke ni esperantistoj ne toleros lamigon de nia agado pere de iuj ajn eksteraj bremsoj.

Sed la ĝenerala situacio de la fervojo kaj la ordonoj de la registaro kaŭzas konatan ŝrumpigon de la personara nombro, kaŭzos do malkreskon de la nombro de fervojistoj entute, sed speciale de junaj. Kaj por ĉiuj restantaj kolegoj kun la plej granda certeco la fervojserva ŝarĝo fariĝos ankoraŭ pli granda ol nuntempe. Des pli malforta estos la preteco, dediĉi parton de la libera tempo al supozita aldona ŝarĝo, kiel unuavide impresas lernado de fremda lingvo. Jen gravaj estontaj problemoj por ni.

Nia lingvo estas bazo de mondvasta movado. Ofte ni asertis, ke ni ne nur fariĝis esperantistoj por ĝui la sendubajn avantaĝojn de tiu lingvo, sed ke ni sentas nin devigataj servi al unu el la plej noblaj ideoj momente ekzistantajn. Ni nun pruvu tion, ĉar la tempo de pruvado evidente venis."

Kurt Jentsch mortis


Darmstadt. Kurt Jentsch, Ober Ramstadt, esperantisto de ĉ. 20 jaroj, membro de GEFA kaj GEA, subite mortis kelkajn tagojn antaŭ la jarkunveno de GEFA en la aĝo de 68 jaroj. La mortinto estis kasisto de la IFEF-kongreso en Fulda, ĝis 1974 kasisto de GEFA kaj aktiva esperantisto en Darmstadt. Li estas la kreinto de la GEFA-ekspozicio, kiu estis montrita jam en multaj lokoj. La Esperanto-movado perdis aktivan membron. Ni kondolencas al la edzino kaj parencoj.

Lapenna en Paderborn

Paderborn (hb/pp) La 22-an de septembro - survoje de Sarlando al Kopenhago - prof. d-ro Ivo Lapenna kune kun malgranda delegacio vizitis Paderborn. Li inspektis kun granda intereso la novan Esperanto-centron en Paderborn, Riemkestrasse, kie laboras Roger Imbert. Kun Hermann Behrmann li partoprenis gepatran kunvenon en elementa lernejo, kie li donis bazajn sciojn pri la E-historio kaj signifo. Li vizitis ankaŭ la Esplorcentron kaj havis sufiĉe longan interparolon fakan kun prof. d-ro Frank. Krome li kunsidis kun d-ro Hans Kasselmann, estro de la E-societo Paderborn.

Denove havebla

Wieder lieferbar



El la vivo

de Netaŭgulo

La ĉarma rakonto de la germana romantikulo Joseph von Eichendorff
(germana titolo "Aus dem Leben eines Taugenichts")

Esperanto-traduko de Paul Bennemann

Formato 12,2 x 19,4 cm; 140 paĝoj, broŝ., prezo 7,50 GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113

PSchK Nürnberg 819 56-851 Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579

(Libroservoj ĝuas rabaton de 25 %)

Esperanto-vortaroj por germanoj

Denove haveblas:

Butin-Sommer, Esperanto-Deutsch, 12,5 x 17 cm, 244 p.,
tote bindita (pro la altaj bindokostoj nova prezo)

14,40 GM

En GDR reaperis:

Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch de Krause	6,50 DM
Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto de Krause (Elĉonejo VEB Enzyklopädie Leipzig)	6,50 DM

Krome haveblas: Wingen, Deutsch-Esperanto	8,25 DM
Handwörterbuch Esperanto-Deutsch	1,50 DM
Handwörterbuch Deutsch-Esperanto	3,50 DM
Wingen, Wörter der Gegenwart	3,90 DM